

Leterkesto 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-010-A-3

Cl.- Parolas Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris pasintsemajne malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj de 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto de ilia familia nomo.

Ni salutas A. BERNHARD en Alvesata (Svedio) kiu raportis pri la vigliĝo de la kontaktoj inter Svedio kaj la baltaj landoj. Ni citas lin:

A.- "La moviĝo en la baltaj landoj ankaŭ ŝajnas favori nian lingvon. Ĵurnalisto el Tallin prelegis pri Estonio kun bildoj de la aktualaj okazoj lastatempe, sed ankaŭ pri la pasinta tempo kiam la svedoj havis influon en la lando. Li estas ankaŭ kunlaboranto ĉe la esperanto-elsendoj en Tallina radio kiu elsendas esperanton dufoje monate."

Cl.- Kaj A. BERHARD konkludas sian leteron dirante:

A.- "Do ni salutas kaj lasas tiun raporton kiu eble plezuras al vi. Leteroj ja ĉiam estas bonvenaj. Se oni ne trovas ian sendaĵon en la poŝtkesto, oni sentas, ke io mankas. Estas same kiel kiam oni traserĉas la fiŝkaptilon kaj nenia fiŝo estas videbla post longa remado."

Cl.- Povu la alvoko de nia sveda aŭskultanto veki la skribemon de vasta aŭdantaro, ke nia leterkesto tuj repleniĝu kaj devigu nin tre baldaŭ rekonversacii kun vi. Cosetta BERNARDI en Sisto di Poviglio (Italio) interese raportis pri trilanda festo okazinta sur la monto Triangula Pinto, kiu estas 1'509 metrojn alta kaj renkontiĝloko de la limoj, kiuj dispartigas Aŭstrion, Italion kaj Jugoslavion. La 10-an de septembro pasintjara retroviĝis sur tiu monto pli malpli 20'000 personoj, venintaj el la tri landoj. Kaj Cosetta BERNARDI skribas, ke

A.- "en la plej grava momento de la festo la tri urbestroj respektive de Arnoldstein, de Tarvisio kaj de Ratiĉe, kiuj kunvenis ĉirkaŭ la artistan montaran cipon "Dreiländereck", post la interŝanĝo de la salutoj, publike kaj solene promesis al la ĉeestantoj kaj al la ĵurnalistoj de la gazetaro, de la radio kaj de la televido tien kunvenintaj, siajn intencojn subteni kaj promocii la enkondukon kaj instruadon de Esperanto en la lernejoj, kiuj troviĝas en iliaj jurisdikcioj.

Cl.- Ni esperas, ke tiu promeso realiĝos kaj tre volonte atendas novajn sciigojn pri tiu temo. Ni ricevis vorton de Andres BICKEL en Ĝenevo (Svislando). Jeremy HIERBACH en Pittsburgh (Usono) aŭskultas ne nur esperante, sed ankaŭ angle kaj germane la elsendojn de Svisa Radio Internacia. Ni salutas Gunnas BIRGERSSON en Malmö (Svedio) kaj Luis BLASCO en Zaragosa (Hispanio), kiu skribis

A.- "Mi aŭskultas konstante ĉiujn viajn esperantajn radio-elsendojn kaj sonbendigas ilin por aŭskultigi ilin en la esperanto-klubo."

Cl.- Li sopiras, kiel pluraj aliaj geaŭdantoj, al leterkesto, dirante, ke

A.- "ĝi alportas amikecon, varman etoson kaj kultivas la internan ideon."

Cl.- Ni esperas, ke hodiaŭ Luis BLASCO povis nin aŭdi kaj eble registri. Amikecojn al Anton BLIKMAN en Haarlem (Nederlando), kiu raportis pri siaj interesoj:

A.- "Mi interesiĝas pri la naturo, speciale pri orkideoj kaj papilioj. Nur pri tiuj temoj mi serĉas korespondantojn."

Cl.- Se aŭskultanto ankaŭ korespondema, kiu ankaŭ interesiĝas pri orkideoj aŭ papilioj volas lin kontakti, li skribu al:

A.- Anton BLICKMAN, Palamedesstraat 17, NL 2026 VV HAARLEM, Nederlando. Mi literumas:

Cl.- Niajn perradiajn salutojn ni direktas al Wolfgang BOHR en Bad-Neuenahr-Ahrweiler, al Serio BOSCHIN en Treviso (Italio) kaj al la aliaj membroj de la esperanto-klubo de Treviso. Thomas BORMANN en Mannheim (Germanio okcidenta) havigis al ni ekzempleron de la informilo Esperanto Informations-Dienst, kiu raportas pri la piej grava kolekto de esperanto-libroj en germana urba biblioteko. Temas pri tiu de la biblioteko en Aalen. Fine de sia artikolo li asertas, ke tiaj bibliotekoj kun dekmilo da esperanto-libroj ekzistas en Okcidenta Eŭropo nur en Wien, London kaj Rotterdam. Strange, ke li forgesis La Chaux-de-Fonds en Svislando, kies kolekto estas pli grava, ol tiu de Aalen kaj tre kompleta en interlingvistiko. Ni salutas R. BREN-GYR en Einsiedeln (Svislando), Grete BREUNLICH en (Germanio okcidenta) kaj M BROUSSEAU en Montreal (Kanado), kiu petis specimenon de la revuo "Literatura Foiro". Li skribis:

A.- Ege plaĉas al mi la elsendaĵoj de Svisa Radio Internacia. Mi aŭskultas ilin dufoje ĉiusemajne kaj lernas multon pri la internacia lingvo kaj Svislando."

Cl.- Jean CALAMY en Gemenos (Francio), fidela aŭskultanto, ne havis tre agrablan jaron 1989-an. Ni citu lin :

A.- "Jam delonge mi ne skribis al Svisa Radio Internacia kaj mi hontas pri mia pigreco. Sed, por senkulpiĝi min, mi devas aldoni, ke pro kormalsano mi trapasis tre malbone la jaron 1989-an. Nun mi sentas min iom pli bone kaj deziras danki vin pro via agado."

Cl.- Kaj li listigas aron da elsendoj, kiuj plaĉis al li. Saluton al Florin CARAGEA en Frankfurt am Main (Germanio okcidenta kaj Marcello CASELLI en Roma (Italio), kiu bedaŭras kun multaj aŭskultantoj la mallongecon de niaj elsendoj. A. CHALM en Le Havre (Francio) sin diras tre malfidela aŭskultanto. Sinjorino B. CHEVERRY en Baugé (Francio) raportas pri la kursprogramo de Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj. En la monatoj julio kaj aŭgusto okazos en la Kastelo Grésillon Internacia Amika Renkonto, prelegoj kaj kursoj.

A.- Programo estas petebla al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 BAUGÉ (Francio). Mi ripetas literumante.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia, Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj, la venontan semajnon. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012